PANORAMO-INFO

Sciiga letero por la Esperantistaro en Saksio-Anhaltio

14-a jarkolekto 2005-4

Espereble vi bone glitis en la novan jaron.



Sanon kaj ĉion bonan por la jaro 2006
deziras Panoramo-Info al ĉiuj legantoj!

ANABEL 2005 (Aŭtuna Najbara Aranĝo kun Borso de Esperanto-Literaturo)

Jam monatojn antaŭ la komenco de nia aranĝo ANABEL ni ricevis de kelkaj fidelaj gastoj senkulpigojn, ĉar ili ĉijare ne povis partopreni. Sed ĉiuj promesis partopreni en venonta jubilea jaro (20a ANABEL). Malgraŭ tiaj fruaj negajigaj mesaĝoj partoprenis gastoj el multaj partoj de Germanio. La oficiala komenco estas ĉiujare je la 10a horo, sed ĉar niaj gastoj alvojaĝas per trajno, ankaŭ ĉijare la alvenoj distris sin de la 9a ĝis la 10a horo kaj 30 minutoj. La aranĝo okazis kiel en la lastaj jaroj en la ĉambroj de la fondaĵoj de Francke, en „Jugend-Bauhof.“ Escepto ne estis evitebla: niaj geamikoj el urbo Herzberg (koromonto) el Malsupra Saksio alvenis nur je 11:45 h, ĉar pro fervoja konstruado ili devis uzi buson por parto de la distanco ĝis Halle.
Post malgranda matenmanĝo la programo komenciĝis per rondirado tra la urba centro kun komuna tagmanĝo en restoracio. La rondirado komenciĝis nur je 11:30h. La partoprenintoj iris tra la korto de tilioj de la fondaĵoj de Francke, preter la monumento de la fondinto al la placo Jerusalemer Platz, rekte ĉe la iama sinagogo de Halle. De tie la partoprenintoj pluiris al la placo Alter Markt (Malnova foiro). Poste niaj gastoj vizitis ĉe la centra placo la domon, en kiu niaj urbaj deputitoj kunsidas kaj debatas urbajn aferojn, kaj en kiu ankaŭ troviĝas la salonego por geedziĝi. Vidalvide de tiu domo staras novkonstruita grandmagazeno, al kiu apartenas kafejo en la kvara etaĝo. De tie ĉiuj niaj gastoj povis ĝui rondrigardon sur nian centran placon. Sur Hallmarkt (salofoiro) ni rondiris la faman puton kun skulptaĵoj el la historio kaj legendoj de Halle. Post la komuna tagmanĝo en retoracio proksime de la koncertejo Händelhalle (*salonego de Händel*) iris la rondirada grupo reen al la aranĝejo en la fondaĵoj de Francke.
Ĉirkaŭ la 14a horo komenciĝis nia kultura programo. Tiu programo estas miksaĵo el kontribuoj de niaj gastoj kaj de la anoj de la E-grupo en Halle. Sinjoro Beau el Schweringen en Malsupra Saksio prelegis pri poŝtmarkoj kun Esperanto-motivoj. Tradicie inter aliaj programeroj estis la kantado de la germana kanto “Sah ein Knab’ ein Röslein stehn“ (*Erikeja rozo*). Ĉifofe po unu strofo en ok diversaj lingvoj, en Volapuko, en Esperanto, en Ido, en la germana, la slovaka, la angla, la rusa kaj la hungara lingvoj. Ni posedas ankaŭ du tekstojn en armena kaj hispana lingvoj, sed bedaŭrinde oni ne povas kanti ilin laŭ la kutima melodio. Ankaŭ la Ido-versio ne bone kongruas al la melodio laŭ la kvanto de la silaboj. Nova programeroj estis aŭkcio. Post la kultura programo ĉiuj babilis ĉe kafo kaj kuko ĝis la adiaŭo je la 18a horo.

ugg

Sur la foirplaco de Halle:
- sidejo de la deputitoj de la urbo *(maldekstra bildo)*
- Händelmonumento *(dekstra bildo)*

Novĵoj el la ŝtonepoko

Ĝustatempe la 21an de decembro oni reinaŭguris la Cirklan Fosaĵon de Goseck. Ĝi havas jam 7000 jarojn kaj ebligis precize observi la tagojn de la komenco de la sezonoj per rigardo el la centro al la punktoj ĉe la horizonto, kie la suno leviĝas aŭ subiras. En la jaro 1991 la arkeologo s-ro Otto Braasch hazarde malkovris ĝin dum transflugado de la tereno. Daŭris kelkaj jaroj ĝis oni pli detale esploris la kampon per magneta analizo. Unua fosado komenciĝis en 2002 sur kampeto de 10m x 50m. Oni malkovris parton de la observatorio, pecetojn de stribendaj ceramikaĵoj kaj el la linearbenda tempo (antaŭanta periodo), restaĵojn de longa doma kun argilkovritaj plektaĵmuroj kaj du ujojn.
En la jaro 2003 oni denove fosis en tiu kampeto kaj en pli suda parto (30m x 40m). Tiel oni elfosis tutan sudan pordegon de la cirklo.
Per pliaj fosadoj oni malkovris ostojn de bovoj (plejofte kraniojn) kaj en tri profundaĵoj homajn ostojn. Jam en la pratempo ĉiuj ostoj estis zorge prilaboritaj por senkarnigi ilin. Tio eble estas indiko pri oferado de homoj aŭ pri specialaj entombigaj ritoj.
De junio 2005 ĝis oktobro 2005 oni fosis sur la tuta tereno kaj rekonstruis la tutan cirklon. Por la reinaŭguro oni elektis la tagon de la vintra solstico.
La cirklo troviĝas sur ebenaĵo iom super la valo de la rivero Saale kaj konsistas el bone rimarkebla, preskaŭ perfekte cirkla fosaĵo kun diametro de 75m. Ĝi havas tri alirojn kun flankaj fosaĵoj. La direktoj de la aliroj estas: norden, sudokcidenten kaj sudorienten. En la centro troviĝas restaĵoj de du koncentraj palisaj cirkloj kun la jam mencitaj pordegoj. Laŭ astronomiaj kalkuloj la sudaj pordegoj montras al la horizontaj punktoj de sunleviĝo kaj de sunsubiro je la tago de la vintra solstico (+/- kvar tagoj) en la jaro 4800 a.K.. La tria pordego montras akurate norden. Pro tio la tuta konstruaĵo tre verŝajne estas observatorio. En la jaro 2004 oni trovis plian helpilon en la palisoj por ekkoni la someran solsticon. Laŭ la trovoj de ceramikaĵoj oni taksis la tempon de la konstruado je 5000 a.K.. La Cirkla Fosaĵo aŭ Sunobservatorio de Goseck estas la plej aĝa konata Henge-monumento. Ĝi estas pli aĝa (je ĉ. 2000 jaroj) ol la fama Stonehenge en Britio.

Tiu arkeologia trovaĵo pruvas ke la astronomiaj konoj de niaj prauloj en la neolitiko (juna ŝtonepoko) estis ege pli grandaj ol oni ĝis nun supozis.

Goseck estas urbeto inter Naumburg kaj Weißenfels en suda Saksio-Anhalto (51°12'01" norde, 11°51'51" oriente).
La informoj estas plejparte el la germanlingva Vikidedio. La bildo estas el la gazeto Mitteldeutsche Zeitung de la 17a de decembro 2005.

jogo

La Ĉiela Disko de Nebra

Preskaŭ en la sama regiono (en suda Saksio-Anhalto) oni trovis plej aĝan bildigon de stela ĉielo. Ĝi estis trovita en la jaro 1999 de rabfosantoj. Ekde 2002 ĝi apartenas al la Federa Muzeo pri Prahistorio de Saksio-Anhalto en Halle.
Laŭ glavoj, kiuj estis kun la disko en la sama loko, oni taksis la aĝon de la disko 3600 jarojn (el la bronza tempo). Por la disko mem ne eblas kompari ĝin kun aliaj objektoj, ĉar ĝi estas unika trovaĵo.
Pro tio ankaŭ estas duboj pri la samtempeco de la disko kaj la glavoj, sed neniu altteknika esplormetodo (ekzemple per fortaj rengenaj radioj) ĝis nun povis subteni tiujn duboj. La materialo de la disko tiom similas al la materialo de la glavoj, ke estas plia indiko pri la samtempeco de la trovitaj aĵoj.
La disko estas preskaŭ perfekte ronda kaj havas diametron de ĉ. 32centimetroj kaj dikecon de 4,5mm en la centro kaj 1,7mm ĉe la rando. Ĝi pezas 2 kilogramojn kaj estas el bronzo (alojo el kupro kaj stano). La kupro devenas el Bischofshofen (orientaj alpoj). La oraj partoj estas el maldika ora lado. Por fiksi la partojn sur la disko oni submetas iliajn randojn en la bronzan diskon. Oni povas konstati prilaboradon de la disko en diversaj tempoj. Unue estis nur la plena luno, la kreskanta luno, la Plejado (grupo de steloj en la konstelacio Taŭro) kaj la aliaj steloj. Due oni almetis la horizontajn arkojn por sunleviĝo kaj sunsubiro. (En la supra bildo ĉe la dekstra kaj maldekstra rando; la maldekstra oraĵo mankas, sed por la ekspozicio oni rekonstruis la diskon.) Kelkaj steloj ricevis alian lokon. Trie oni almetis la sunbarkon en la suban parton.
La disko estas centro de vere impona ekspozicio kun la titolo „*La forĝita ĉielo*“. Multaj raraĵoj akompanas la diskon – ekzemple la Sunĉaro de Trundholm, kiun ludonis la Nacia Muzeo Kopenhago.
Mi vizitis la ekspozicin, kiam ĝi estis en Halle (15a de oktobro 2004 ĝis 22a de majo 2005), kaj povas rekomendi ĝin al ĉiu interesiĝanto pri prahistorio.

Eblas viziti la ekspozicion:
de 9a de novembro 2005 ĝis 5a de februaro 2006 en Vieno,
de 10a de marto ĝis 16a de julio 2006 en Mannheim.

la informoj estas el germana Vikipedio, la bildo estas de faldfolio de la ekspozicio

jogo

Liebe Mitglieder und Freunde,

Ein neues Jahr hat begonnen. Wir hoffen, dass Sie auch im Jahr 2006 unserer Gruppe PANORAMO Ihre Sympathie erhalten, uns nach Möglichkeit unterstützen und weiterhin PANORAMO-Info beziehen mögen.

Das Jahresabo kostet 5,-EUR – aber auch über Spenden würden wir uns natürlich sehr freuen. Überweisen Sie den entsprechenden Beitrag auf das Konto der Esperanto-Gruppe Halle. Die Kontoverbindung finden Sie auf der letzten Seite unten. Bei der Überweisung geben Sie bitte als Verwendungs-zweck „Panoramo-Info 2006“ an. Alternativ können Sie uns auch Briefmarken an die Postadresse der Gruppe schicken.

Möglicherweise haben Sie aber auch bereits bezahlt (z.B. bei unserer Veranstaltung ANABEL) oder Sie gehören zu den glücklichen Empfängern eines kostenlosen Exemplares.

Bonan sukceson por la jaro 2006!

Sanon kaj ĝojon kun kaj per Esperanto deziras

via Esperanto-grupo PANORAMO

Radio Corax, elsendo okaze de Zamenhof-tago

La 15-an de decembro 2005 Achim Kaufhold kaj Jörg Gersonde estis gastoj de la nekomerca radioprojekto „Radio Corax“. Dum 20 minutoj estis programeto el muziko kaj intervjuo pri Esperanto (ĝeneralaj demandoj: kio estas Esperanto? kie oni povas lerni ĝin?).

Nia kutima E-elsendo, kiu okazas en ĉiu monato la duan vendredon je 13:00h, baldaŭ paŭzos kaj poste ricevos novan lokon en la programo – verŝajne eĉ pli bonan.

Radio Corax estas akirebla en la urbo Halle kaj la ĉirkaŭaĵo per la frekvenco 95,9 Mhz. Sed pli bonan kvaliton oni havas per la reta elsendo. http://www.radiocorax.de

La reta elsendo (livestream) estas havebla per la adreso http://212.122.41.133:8000/corax.ogg

jogo

regulaj renkontiĝoj

Eo-grupo PANORAMO - Halle:
1-a mardo, 18.ooh: E.-Abderhalden-Str. 20
3-a mardo, 18.ooh: Bölbergasse
(restoracio "Zum Schwarzbrenner")
4-a mardo, 17.ooh: PIKo, informu vin

Eo-Gruppe Magdeburg:
ĉiu 2a mardo (ne en julio, aŭgusto),
Steubenallee 2

Eo-Klubo "Karapaco"
Zeitz: Dirk Bindmann, ✆+🖷 03441-273251
walden@t-online.de
Altenburg: kaiser-altenburg@t-online.de
✆ 03447-4012

eventoj

pliaj:
http://aliaflanko.de/kalendaro/
http://www.eventoj.hu

17.-19.02.2006 **Herzberg**
trejnkurso por instruontoj, **ICH**

19.02.2006 **Pirna**
Norbert Karbe,
03501-773232, nokosaksio@tiscali.de
19.03., 09.04., 17.09, 12.11., 17.12.2006

24.02.-02.03.2006 **Herzberg**
Esperantokursoj, 3 niveloj, **ICH**

31.03.2006 **Dresden**
Esperanto-Literatursalon, E-Stammtisch
http://www.esperanto-dresden.de
28.04., 19.05., 30.06.2006

10.-17.04.2006 **St. Andreasberg**
Printempa Semajno Internacia
http://www.esperanto.de/psi

29.04.2006 **Bernburg**
jarĉefkunveno de **ELSA**

20.05.2006 **Schkeuditz**
promenado tra la arbaro Domholz
E-grupo Halle

02.-05.06.2006 **Braunschweig**
83a kongreso de GEA, 100 Jahre **DEB**,
ICH

06.-09.06.2006 **Herzberg**
postkongresaj tago, **ICH**

11.06.2006 **Halle**
E-grupo Halle invitas
(samtempe estas Händel-festivalo en la urbo)

adresoj

DEB - Deutscher Esperanto Bund
Immentalstraße 3, 79104 Freiburg,
✆ 0761-289299, Info 0180-esperanto
(-3773726)
gea@esperanto.de http://www.esperanto.de

UEA - Universala Esperanto Asocio
Ĉefdelegito por Germanio:
d-ro Wolfgang Schwanzer,
Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz
✆ 06136-46232, http://www.uea.org

SAT - Sennacieca Asocio Tutmonda
Peranto por Germanio: Jiri Proskovec,
Heimbaustraße 10, 44143 Dortmund
proskovec@aol.com

ELSA - E-Ligo Saksio-Anhaltio
Jörg Gersonde, H.-Wäschke-Str. 31,
06366 Köthen, ✆ 03496-558517
joerg.gersonde@esperanto.de

E-Grupo "PANORAMO" Halle
Siegfried Linke, Fischerstecherstr. 23,
06120 Halle, ✆+🖷 0345-5500348,
halle-saale@esperanto.de
http://www.esperanto-halle.de

E-Grupo Magdeburg
Edith Plümecke, Simonstraße 15,
39114 Magdeburg, ✆ 0391-8117421
DDungert@t-online.de
http://www.beepworld.de/
members75/esperanto-dungert

E-Grupo Leipzig
Werner Geidel, Karlsruher Str. 5 d
04209 Leipzig, ✆ 0341-4118577

ICH Internacia Centro Herzberg
Peter Zilvar, Grubenhagenstr. 6,
37412 Herzberg, ✆+🖷 05521-5983
esperanto-zentrum@web.de
http://www.ic-herberg.de

Literarurdienst "ESPERO"
Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18
27333 Schweringen, ✆+🖷 04257-983223
RoBo.ESPERO@t-online.de

Bücherdienst/Libroservo
wolfgang.schwanzer@esperanto.de
http://www.esperanto-buchversand.de
✆ 06136-46232

PANORAMO-Info

Herausgegeben von der Esperanto-Gruppe „PANORAMO" Halle,
fina redaktoro: Jörg Gersonde, H.-Wäschke-Str. 31,
06366 Köthen, 03496-558517, joerg.gersonde@esperanto.de
Bankverbindung: August Grosch, Kto.: 480 144 352,
BLZ 800 537 62, Stadt- und Saalkreissparkasse Halle